

La Merkato

ISSN 0941-9306

Moneybookers aŭ Paypal?

Ekzistas pluraj sistemoj por interrete fari malgrandajn pagojn, ekzemple kotizojn. Plej konata estas www.paypal.com. Alia sistemo, proponita de membro, estas www.moneybookers.com, malpli konata sed ankaŭ malpli kosta. Ĉu iu leganto havas spertojn kun Moneybookers?

Kotizo

Ĉar IKEF daŭre estas sen prezidanto kaj sen sekretario, ĝia aktivado estas limigita; i.a. nur aperos du numeroj jare de La Merkato. Sekve la kotizo restas duonigita je 7,50 aŭ 5,00 eŭroj/dolaroj, depende de la landokategorio. Rigardu vian adresetiketon: se via kotizo validas ĝis la jaro 2006, plilongigo por 2007 (aŭ poste) jam nun bonvenas.

Enhavo

Kongresaj raportoj	3-4
Eŭropa Unio - Ĉinio - Vikipedio	5
Novaj membroj kaj adresoj	6-7
Asekura terminaro aperis	7
Reta radiostacio en Urugvajo	8
Komercaj petoj kaj proponoj	9-11
Fervoja Terminologio: Liverkondiĉoj kaj damaĝoj de varoj	12-19
IKEF-anoj aktivis - Laborplanoj farotaj	20

La Merkato (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

Estraro de IKEF: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNISS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. Ooba Atsua; S-ro WANG Tianyi. **Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco POLERANI.

Financa sidejo kaj membrara administrado: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert@telenet.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). [Tarifoj provizore duonigitaj ekde fino de 2005.] Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoŭficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo (laŭ plena tarifo). Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*

- belga poŝtekonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

Perantoj

Internacie: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj@fel.esperanto.be)

Brazilo: Silvio KNISS MATES (silvio@siscobras.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco@public.xa.sn.cn

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso@wanadoo.fr

Germanio: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun@t-online.de

Hungario: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, istvan.gether@office.ksh.hu

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani@tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama@qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

Kroatio: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka@ri.htnet.hr.

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

Kongresaj raportoj

(pli da detaloj kaj fotoj je www.ikef.org, rubriko 'Aktuale')

Ĝenerala Jarkunveno de IKEF (mardo, 1 aŭgusto 2006)

Ĉeestis nur la estraranoj Ooba kaj Rotsaert; tiu lasta gvidis la kunvenon. Komence estis aprobitaj la jarraporto pri la agado kaj la financa raporto pri 2005; la estraranoj estis malŝarĝigitaj.

La reelekton de la estraro gvidis s-ro Braun. La estraranoj Kurz kaj Wang, kiuj atingis la finon de sia dujara deĵorperiodo, rekandidatiĝis, sed ambaŭ bedaŭris ke pro sia profesia okupiteco ne restos al ili multe da tempo por kontribui al la IKEF-agado. Ne anoncis sin aliaj kandidatoj. Kurz kaj Wang estis unuanime reelektitaj.

La ĉefan parton de la posta diskuto okupis la projekto de nova, reta mem-broadadministrado. La opinioj pri teknikaj kaj enhavaj aspektoj estis tre diversaj. La ĉefaj partoprenantoj en la diskuto, interkonsente kun s-ro Wang kaj d-ro Hornecker (la desegnanto de la proviza sistemo), post la UK rete interŝanĝos opiniojn. *[La sistemo nun estas anoncita por la fino de la monato oktobro, tro malfrue por la redaktofino de ĉi tie numero de La Merkato. Interesitoj do rigardu la retpaĝojn. - red.]*

Rob Ebenau atentigis pri Ecademy, priskribita en La Merkato 91, sistemo kiu povas jam parte plenumi la taskojn de la reta membrejo.

Poste ĉiuj ĉeestantoj prezentis sin. Evidentiĝis ke tio estas tre interesa ero, nepre ripetota en la venontaj kunvenoj.

Fine estis ankoraŭ ideo-interŝanĝoj pri la kosto de internaciaj pagoj (kiu restas alta; Paypal - la pagsistemo de Ebay - estis proponita kiel solvo por etaj pagoj), pri terminologio laboro ĉe kroataj fervojoj kaj pri la neceso varbi artikolojn kaj reklamojn por la revuo Monato.

Roland Rotsaert

Vizito al la Komerca Ĉambro de Florenco

Je jaŭdo matene, 3 aŭgusto 2006, proksimume 25 personoj (membroj de IKEF kaj interesitoj) estis akceptitaj de d-ro Gerri Martinuzzi, estro de la Ĉambro de Komerco de Florenco (<http://www.fi.camcom.it/>).

Komence la gastoj ricevis klarigojn pri la funkciado de la ĉambro. Estas sendependa publika instanco, financata je 70 % el kontribuoj de membroj kaj je 30 % el liveritaj servoj. Ĝi entute havas 300 dungitojn.

Evidentiĝis ke en unu institucio estas grupigitaj multaj taskoj, de registrado de entreprenoj ĝis protekto de konsumantoj. Kiam estas oportune, ĝi ankaŭ rekte investas en projektoj; ĝi ekzemple estas kunproprietulo de la kongres-ejo kie okazis la UK. Ĝia neta havaĵo sumiĝas je 55 milionoj da eŭroj.

Poste d-ro Martinuzzi donis detalojn pri la ekonomia vivo en la regiono Toskano kaj ĝia ĉefurbo Florenco. Kun produktado je loĝanto de 25.000 eŭroj, Florenco okupas la kvinan lokon inter la 103 italaj provincoj. La senlaboreco estas 4,5 %, kompare kun 7,5 % tutlande.

El la publiko venis la demando kiel multifaceta ĉambro kapablas samtempe defendi entreprenojn kaj konsumantojn. Respondo estas ke, garantianta la kvaliton de la entreprenoj, oni ankaŭ garantias bonajn servojn al la konsumantoj.

La enkonduko de la eŭro ĝenerale estas konsiderata pozitiva por Florenco, kvankam la alta eŭro-kurzo rilate al la dolaro nun estas granda problemo por la eksportantoj.

Post la prezentadoj estis ebleco por interbabili ĝuante trinkaĵojn kaj frandaĵojn.

Ankoraŭfoje dankon al d-roj Polerani al Martinuzzi pro la aranĝo!

Roland Rotsaert

Novajoj de la Eldona Oficejo de la Eŭropa Unio

* Centra katalogo (kun mendo-ebleco) de ĉiuj EU-eldonoj nun estas je <http://bookshop.eu.int>.

* La kompleta EU-leĝaro (senpage konsultebla kaj traserĉebla!) troviĝas je <http://europa.eu.int/eur-lex/lex/>.

* Samtema paĝaro, sed kun tradukoj prepare al la aliĝo de Bulgario kaj Rumanio, estas je <http://ccvista.taix.be/>.

* Informoj pri adjudikoj estas je <http://simap.eu.int/> (por sendi informojn por publikigo) kaj je <http://ted.publications.eu.int/> (por konsultado).

* Ekde kelkaj monatoj funkcias, eksperimente, 'N-Lex', interreta portalo ekde kie traserĉeblas la nacia leĝaro de la membroŝtatoj. Adreso: <http://eur-lex.europa.eu/n-lex/>.

Principe ĉiuj paĝoj estas multlingvaj, kvankam eblas ke lingvo de iu nova membro-ŝtato ankoraŭ mankas.

Ĉinio: forumo pri ekonomio kaj komerco

Dum 2 - 5 majo 2005 okaze de Festo 5.1 okazis E-kunveno pri Kulturo kaj Ekonomio en Changsha, Ĉinio. La ĉina peranto kaj estrano de IKEF prezidis la forumon pri ekonomio kaj komerco. Almenaŭ 200 personoj partoprenis la kunvenon, kaj 49 personoj ĉeestis ties forumon pri ekonomio kaj komerco.

Wikipedio

Wikipedia, aŭ esperante Wikipedio, estas projekto pri reta enciklopedio. En ĝi estas je <http://eo.wikipedia.org/wiki/Ekonomio> serio de artikoloj pri Esperanto kaj komerco/ekonomio.

Novaj membroj

349. S-ro CHENG Yonghua, muzikisto, P.O. Box 2421-2, CN-100089 BEIJING, Ĉinio, °1955, chengyong_h(a)hotmail.com. Proponas materiaĵojn pri muziko (diskoj, instrumentoj...)

351. S-ino YU Ximei (Fabina Yu) - Xiamen Shirley Artware Co Ltd, RM.1708, No 293, Baoda Building, Jiahe Road CN-361009 XIAMEN, FJ, Ĉinio, °1965, fakso +86-592-5043869 mobila +86 13606097684 rete beads(a)126.com

352. S-ro SUN Mingjiao, °1964, instruisto-oficisto, Zaozhuang Xueyuan Shebei Chu, CN-277100 Zaozhuang, Shandong, Ĉinio, telefono +86-632-3683738, fakso +86- 632-3256097, rete semio(a)163.com, mobila.+86-13396376717, Skype: semio88 QQ. 442880746

353. S-ro ZHAO Chenghua, °1958, oficisto-administranto, Qingnian Dajie 36, Shenyang Luyou-Ju, CN-110011 Shenyang, Liaoning, Ĉinio, Mobila +86-13940024891, rete azhaochenghua(a)sohu.com

354. S-ro SONG Bin, °1965, ŝtono-komercisto, Futian, Meiguan-Lu 5, Shenxin Dasha B - 808 shi, CN-518049 Shenzhen, Guangdong, Ĉinio, mobila +86-13802242315, rete tuo-xin(a)sohu.com

355. S-ro WU Guoxiong, °1951, ŝipisto, Luoyang-Zhen, Luo-An-Xin-Cun 35, CN-362121 Huian, Fujian, Ĉinio; telefono +86-595-87481501 (h), mobila +86-595-22737537, rete: wgx501(a)126.com. Vendas: ŝuojn, vestojn, ludilojn, plastikajn artaĵojn, ŝtonaĵojn.

356. S-ro Igor WASILEWSKI, ul. Wichowa 18, PL-30-438 KRAKOW, Pollando

357. S-ro Bernard STOLLMAN - UNIKOM, P.O. Box 1261, New York, NY 10009, Usono, rete espmogul(a)aol.com, www.unikom.org

358. S-ro Cyrille HURSTEL, 1 place de Vienne, FR-67210 OBERNAI, Francio

359. S-ro Ferdinand KINKANI, C.P.5859 S/C MBAKI NZOLAMESO, LUANDA, Angolo, ker_ongd(a)yahoo.fr

360. S-ino Peggy LEY - 3-obla-Vo, Bankwikerstr. 35, DE-22041 HAMBURG, Germanio, Sin-o_Peggy_Ley(a)gmx.de, www.verda-varbil-vendejeo.de

361. S-ro Paul Kwasi MENSAH - YAO CONSULT & BUSINESS VENTURES, P.O. BOX 887, AKIM-ODA, Ganao, paulmensah58(a)hotmail.com

362. S-ro LIU Tieshan, Wuyi-Lu, Xinfucheng Fuyuge 8 - 10, CN-410011 CHANGSHA, Hunan, Ĉinio, telefono kaj fakso: +86-731-3657713

Novaj adresoj

218. S-ro Zoran ĆIRIĆ, p.a. MondEtur, 111/174-175 M.9, Soi Buakhao, Nongprue, Banglamung, Branka, Pattaya City, Chonburi Provinco 20150, Tajlando

Asekura terminaro aperis ĉe www.retbutiko.net

Ĵus aperis Asekura Terminaro seslingva (Deutsch - English - Esperanto (kun difinoj) - Français - Magyar - Nederlands) kompilita de profesia asekuristo kaj IKEF-membro Marc Vanden Bempt.

330 paĝoj, formato DIN A4, prezo ĉe Retbutiko de Flandra Esperanto-Ligo: 19,50 eŭroj + afranko. Rekta ligo al la Retbutiko:

http://www.esperanto.be/cgi-bin/mal/Web_store/web_storeie.cgi?keywords=asekura. Retadreso: retbutiko(a)fel.esperanto.be.

Urugvajo: reta radiostacio

La Urugvaja Esperanto-Societo invitas vin partopreni projekton Radio Aktiva, nova interreta radistacio, kiu elsendos dum 24 horoj ĉiutage. Ene de la programaro, kies ĉefa celo estas disvastigi Esperanton kaj ĝian utiligadon inter hispanoparolantoj, ni ŝatus havi fakajn spacojn, kie oni parolos pri diversaj fakaj aferoj en Esperanto, je nivelo komprenebla por ne-faka aŭskultantaro.

Ĉi tio efikas je du niveloj: unuflanke tio estos interesa enhavo por la esperantistaj geaŭskultantoj, kaj aliflanke montros al neesperantistoj la praktikan utiligadon de Esperanto kaj – ni esperas – helpos instigi ilin eklerni nian lingvon. Por atingi ĉi tion, Radio Aktiva elsendos multajn programojn en Esperanto kun enkonduko, klarigoj kaj eĉ resumo, en la hispana.

Ĉar la funkciigado de nia radio estos farita de nepagataj kunlaborantoj, ankaŭ ne povas ni pagi pro la kontribuajoj senditaj de la fakaj asocioj (ĉu skribe, ĉu per sonarkivoj). Anstataŭ tio ni proponas la jenan interŝanĝon de servoj:

* Vi sendas al ni raportojn, novaĵojn, prelegojn aŭ eĉ edukprogramojn pri aferoj ligitaj al la fako de via asocio. Tiujn kontribuajojn ni elsendos en fakaj programoj.

* Ni donos al vi propran spacon por via asocio, ene de nia programaro. La tempodaŭron kaj oftecon de via programero ene de nia programaro ni kunagordos retroŝte. La enhavo kaj respondeco pri tiu radiospaco estas via; Radio Aktiva nur donas al vi tiun spacon tute senpage, por ke vi profitu ĝin.

* Malgraŭ ke vi akceptos aŭ ne fari la antaŭan interŝanĝon, ni invitas vin sendi al ni, kiel ofte necesos, informaĵojn pri la agado de via asocio, pri eventoj organizotaj de vi, ktp. Tiujn informojn ni dissendos ene de niaj novaĵ-programoj.

Por ni estus tre agrable havi en nia programaro 2- ĝis 5-minutajn voĉartikolojn aŭ prelegojn pri fakaj temoj, jen instruigaj, jen prinovaĵaj, sed ĉiam kompreneblaj por la ĝenerala publiko.

Rado Aktiva komencis elsendi la 21an de septembro de 2006 (rigardu je <http://radioaktiva.esperanto.org.uy/>). Se via asocio aŭ iuj el siaj individuaj membroj volas partopreni ĉi tiun projekton, ni petas al vi informi nin kiel eble plej baldaŭe por pretigi la detalojn. Ĉiun demandon aŭ klarigpeton – kaj kompreneble, via jesan respondon – bv. sendi al [ues\(a\)esperanto.org.uy](mailto:ues(a)esperanto.org.uy).

Elkore kaj samideane,

Daniel Bebelacqua, [rdba\(a\)adinet.com.uy](mailto:rdba(a)adinet.com.uy)
Respondeculo pri Radio Aktiva (je la nomo de U.E.S.)

Komercaj petoj kaj proponoj - Sinprezentoj de membroj

Angolo

La Funebra agento NKUKA PEDRO (PAPA KULA) volas kunlabori kun alilandaj firmaoj kaj importi la ĉi-subajn funebraĵojn: funebran veturilon, aŭtobuseton, ĉerktenilojn, mortotendojn kaj fantaziaĵojn, diverstipajn ĉerkojn kaj tombojn; ankaŭ industriajn lignomaŝinojn.

Kore dankas: Ferdinand KINKANI, [rete_ker_ongd\(a\)yahoo.fr](mailto:rete_ker_ongd(a)yahoo.fr), membro de IKEF

La firmao AMIP, ĝenerala komerco, importo kaj eksporto, volas kunlabori kun firmaoj tra la mondo pri jenaj temoj: konstruado, ĝenerala komerco, industrio, industria fiŝkaptado, boatmotoroj de 2 cilindroj kiel 45kva, 40kva, 26kva, 20kva., ligno, presilo, lernejaĵoj, ktp. Ni bonvenigas ankaŭ personojn kiuj volas veni al nia lando.

Kontaktadreso: s-ro Joao Claudio T. NSOKO, C.P.5474, LUANDA, telefono 0024492402048, retadreso [jc_nsoko\(a\)yahoo.fr](mailto:jc_nsoko(a)yahoo.fr).

Bulgario - Turkio

Aleksandro Zahariev, [avzbg\(a\)yahoo.com](mailto:avzbg(a)yahoo.com) reklamas:

- Ĉio el Bulgario kaj Turkio! Sendu viajn petojn.

- Serĉas malnovajn ŝipojn por skrapado! Sendu fotojn kaj ofertojn.

Ĉinio

En nia urbo pruduktatas fajrita materialo de cemento. Interesitoj kontaktu kun Semio, [semio\(a\)163.com](mailto:semio(a)163.com).

Skribiloj (ball pen) USD 0.02/pc FOB Shanghai. Kontaktu chielismo [\(a\)yahoo.com.cn](mailto:(a)yahoo.com.cn).

Unu eta varo sed tute nova kaj superteknika, lavtuko el natura lignofibro, produktita en Ĉinio per speciala tekniko, senigante sukeron, grason kaj statikan elektron. Ĝi estas mola, rezista al fungo, facile seka kaj lava, frotas oleaĵon, malpurajon kaj ŝviton sen bezono uzi iujn ajn purigaĵon, post ĝia uzado oni ĝin lavas nur per klara akvo. Jam sufiĉe multe ŝparis tempon, purigaĵon, akvon kaj tiel plu, solvis multajn mankojn de tradicia lavtuko, tre taŭgas uzi al purigado de manĝilaro, trinkilaro, teoilaro, meblo, elektra aparato, planko, aŭtomobilo, hotelo, lavvizaĝo, bano kaj diversaj flankoj. Kontaktu Yonghua Cheng, [chengyong_hhh\(a\)yahoo.com.cn](mailto:chengyong_hhh(a)yahoo.com.cn).

Germanio

Mia nomo estas Peggy Ley. Mi kreis la servon 3-obla-Vo, verda-varbil-vendejo, apud mia okupo kiel oficistino pri eksporto en internacie (sed ne esperante) aktiva elektronika firmao. 3-obla-Vo celas al montrado, ke merkata agado ja eblas esperante, ke Esperanto estas taŭga rimedo. Mi celas al vivo ne nur por sed ankaŭ per mia esperanta agado.

Mi ofertas variajn servojn:

- Mi instruas kaj informas pri Esperanto.

- Al kluboj mi ofertas la servon krei aĉetgrupon kaj agi per tiu aĉetgrupo por aĉeti varbilojn je favora prezo pro sinergia mendo-kvanto.

- Aldone mi ofertas la servon sendi salutmesaĝojn nome de la kluboj al iliaj membroj je iliaj naskiĝdatreveno kaj ankaŭ vendas poŝtkartojn al kluboj por mem sendi tiajn mesaĝojn.

Kaj kluboj kaj unuopaj personoj povas aĉeti ĉe mi poŝtkartojn esperant-lingvajn, magnetkartojn kun la tabelvortoj (mezuras same kiel nomkartojn). Aliaj ofertoj sekvos. Volonte mi sendos al vi plurajn informojn aŭ oferton.

Mi kunlaboras en HES kiel sekretario en la estraro, en ILEI kaj AGEI kiel membro, estas membro de UEA kaj ekde nun ankaŭ membro de IKEF.

Litovio

Stasys Kruzinauskas, stkruz@lrs.lt, jam 15 jarojn okupiĝas vendante rezervajn partojn por aŭtomobiloj. Ĝis nun tio estas realizata en u. Vilka-viskis (Litovio). Li akceptus proponon vendi similajn varojn de alia lando en Litovio pogrande.

Tanzanio

Tanzania esperantisto Simba Mramba (retadreso smbmramba@yahoo.com) peras kontaktojn kun s-ro Felix Joseph Chille, respondeculo pri investoj en la regiono de Bunda. Investantoj estas serĉataj por la sektoroj minado, turismo (estas grandaj naturrezervejoj), distribuo de elektronikaĵoj kaj hejmaj aparatoj. Turismo, minado, sanzorgo kaj instruado jam estas bone funkciantaj servoj.

Kontaktu: Felix J. Chille, Bunda, Tanzania, telefono +255 28 2621055 (oficejo), fakso +255 28 2621264 (oficejo), portebla +255 745 560 691, rete felixchille@yahoo.com.

D-ro Zlatko Hinšt (zlatko.hinst(a)hznet.hr)

UNU PARTO DE TERMINOLOGIO EL INTERNACIA KONVENCIO PRI LA FERVOJA VARTRAFIKO:

LIVERKONDIĈOJ KAJ DAMAĜOJ DE VAROJ

Enkonduko

Artikolo estas rezulto en formo de adaptita trarigardo el korespondado kun d-ro Heinz Hoffmann, sekretario de Terminara Sekcio (en Faka komisiono) de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEFE) kies membro estas ankaŭ aŭtoro. La aŭtoro de artikolo reagis al proponoj pri fakterminoj prezentitaj en komunikilo Terminara Kuriero (TeKu) kies redaktoro estas s-ro Hoffmann. Post la unuaj leteroj kiuj estis kontribuo en diskuto pri kelkaj komercaj fakterminoj, sekvis tri daŭrigoj al TeKu numero 126 aperinta la proponojn. Plejparte tio estas originala envicigita teksto el la leteroj. Temo de diskuto estis unu parto de komerca terminologio el Internacia konvencio pri la fervoja trafiko (CIM) kiu rilatas al liverkondiĉoj kaj damaĝoj de varoj. La aŭtoro komparas koncernajn fakterminojn de Fervoja Terminaro de Internacia Fervoja Unio (UIC) en Esperanto, germana, franca kaj angla lingvoj. Interalie, kelkfoje oni uzas koncernajn terminojn el kroata kaj serba lingvoj. Ĉi-tia korespondado kun multaj ekzemploj de faka komerca terminologio kaj konkludoj estas interesa kaj utila por legantoj de „La Merkato“ kaj ankaŭ por IKEF (terminoj por praktiko).

Enhavo de diskuto pri koncerna temo (Konvencio CIM) en kvar leteroj.

02386 interesindiko pri senprokrasta livero (nuna E-termino)

déclaration d'interêt à la livraison (franca)

terminproponoj: 1) deklaro pri damaĝkompenso kaj 2) interesdeklaro pri damaĝkompenso

En aktuale valida CIM (franca mallongigo de Convention International convenant le transport des Marchandises par chemin de fer) en germana teksto sub artikolo 16 troviĝas titolo „Interesse an der Lieferung“. Kroata traduko de CIM el la jaro 1993 uzas terminon „osiguravanje uredne isporuke“. Serba termino (laŭ Teku 126) estas „navođenje interesa uredne isporuke“. Sed en TeKu sub 02386 troviĝas germana termino Lieferwertangabe. Nome, en artikolo 16 de CIM oni preskribas rajton pri senprokrasta livero, aŭ ĝustatempa livero, inkluzive enkalkulado de kompensa sumo (kompenso, rekompenco) pro tarda (malfrua) livero (en germana teksto en unua paragrafo). En dua paragrafo teksto uzas terminon „die Gebühr für Angabe des Interesses an der Lieferung“. Estas evidente ke oni diferencigas terminojn pri livero kaj pri kompenso. Tio signifas ke oni ne povas intermiksi du signifojn en koncernaj aferoj. En Vartarifoj de Kroataj Fervojoj por internlanda kaj internacia trafiko (HRT 156) estas enhavata kompenso por realigo pri ĝustatempa (senprokrasta aŭ sentarda) livero (kroatlingve „naknada za osiguravanje uredne dostave“ (isporuka = dostava). Pro tio estas necese uzi du terminojn sub numero 02386 interesindiko pri senprokrasta livero (eventuale estas ebla kombino de vortoj „interesdeklaro pri senprokrasta livero“) kaj sub 04584 kompenso tardlivera (aliavice „tardlivera kompenso“ - franclingve „indemnité de retard“), ambaŭ kun signo VS20 (Aranĝo de vendo, postvenda servo). En unua traduko de CIM – Internacia Konvencio pri la Fervoja Vartrafiko de la 25-a de februaro 1961 (eldono de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj, tradukintoj Josip Zupanič kaj Ljudevit Sekereš, reviziita de Gvozden Sredić) ekzistas du terminoj. Unue estas en artikolo 20 (termino kaj titolo de artikolo „Interesindiko pri sentarda livero“). Due, en artikolo 36 tradukintoj metis titolon – „Kompensa sumo kaze de interesindiko pri la livero“ kiu ankaŭ estas faktermino. Terminoj „kompenso“ kaj kompensa sumo“ estas egal-signifaj kiel proponita termino „damaĝkompenso“. Evidente en faka terminaro ekzistas multaj sinonimoj. En „Fervoja terminareto Esperanta – serbokroata / Serbokroata – Esperanta“ de Sekereš kaj Zupanič (JAFE, Beograd, 1971.) ekzistas terminoj „intereso pri sentarda livero“ (obezbeđenje urednje isporuke) kaj „interesindiko pri sentarda livero“ (označavanje obezbeđenja uredne isporuke). Serba vorto „obezbeđenje“

estas egalsignifa kiel kroata vorto „osiguranje“). Tio estas preciza klarigo de terminoj kaj oni devas respekti aplikon de terminoj en koncernaj kunteksto.

Ĝenerala rimarko: En E-vortaroj oni uzas vorton „domaĝo (devenas de franca vorto „dommage“) kaj vorto „damaĝo“ en UIC Railway Dictionary (Fervoja Terminaro), eldono de MÁV, Budapest, 1997 (de angla vorto „damage“). En ĉi-tiu artikolo oni uzas „damaĝo“ kaj oni respektas ĝian signifon el respektivaj eldonaĵoj kaj Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.

En menciita „Internacia Konvencio pri la Fervoja Vartrafiko (CIM)“ en traduko de J. Zupanič kaj Lj. Sekereš (eldono en 1968) oni trovas kelkajn specojn de kompensoj. Titoloj de la unuopaj artikoloj (subĉapitroj enkadre de Parto III, Ĉapitro I Respondeco) estas kiel sekvas:

- Artikolo 31 Kompensa sumo pro perdo de varo
- Artikolo 32 Limigo de respondeco pro dumtransportaj pezoperdoj
- Artikolo 33 Kompensa sumo pro difektigo de varo
- Artikolo 34 Kompensa sumo pro la trapaso de livertempo
- Artikolo 35 Limigo de kompenso surbaze de certaj tarifoj
- Artikolo 36 Kompensa sumo kaze de interesindiko pri la livero
- Artikolo 37 Kompensa sumo kaze de malbona intenco aŭ grava malzorgeco de fervojo
- Artikolo 38 Interezo de kompensa sumo. Repago de kompensa sumo.

Kiel estas evidente, unua originala esperanta traduko de CIM laŭlitere uzas kelkajn similajn terminojn por esprimi sentardan liveron (interesindiko pri la livero) kaj tardan (trapaso de delivertempo). En artikolo 20 oni mencias terminon „interesindiko pri sentarda livero“, kiu ankaŭ ekzistas nun en Fervoja Terminaro sub signo VS30. Ambaŭ terminoj 04688 kaj 02386 estas necesaj en CIM pro diferencigo en signifo – evidente ne estas eraroj! Ekzistas terminoj por (laŭ traduko) „perdo de varo“ kaj „difektigo de varo“. Termino en art. 38 „interezo“ (germane Zins) diferencigas de termino „intereso“. Eventuale ekzistas neceso por enkonduki nova(j)n termino(j)n (laŭ via teksto) „interes(indiko) pri sendamaĝa livero“ kun aparta numero.

Oni devas esti atenta en ĉi-tiuj aferoj por ke oni ne elĵetu necesajn fakterminojn aŭ detalojn. Precipe komerca negocado estas kompleksa kaj postulas multajn diferencigojn en signifoj kaj nuancoj kaj finfine estas partoj de dokumentoj (preskriboj, kontraktoj, ktp).

Granda problemoj (en kadro de eldonado de internaciaj konvencioj kaj aliaj juraj preskriboj) estas ŝanĝoj de lingvo (terminoj, vico de vortoj en titoloj, signifoj, ktp). Tio ne signifas ke ni en Fervoja Terminaro (Rail Lexic) estas devigataj konstante ŝanĝi terminojn. Ekzistas devigo de UIC por ŝanĝi terminojn en unuopaj lingvoj se oni pritaksas necese, kaj post tio eventuale en Esperanto kiel devigo de IFEF.

La traduko de Zupanič kaj Sekereš surbaze de tasko de IFEF-Faka komisiono (kiel skribas en Antaŭparolo) laŭ mia opinio estas bonkvalita, sed kiel unua tradukita teksto de internacia konvencio en Esperanto ĝi ne devas esti en iuj detaloj la plej bona. Estas facile konkludi pri oficiala traduko ĉar Esperanto en ĉi-tiu aspekto ne estas nun oficiala lingvo. Sed estas bone konfirmi ĉion bonan (tiama terminologio de UIC ne estas tiel evoluigita - preciza kaj abunda kiel nuntempe kaj tio estas granda limigo por ilia laboro) kaj eventuale korekti, aldoni aŭ proponi novajn signifojn ktp. Tiusence ilia kontribuo estas bona impeto kaj fundamento por pliperfektigi aferon. Oni devas havi respekton al ilia kontribuo senrigarde kiel kaj kial unuopajn solvojn ni ne dezirus aprobi (akcepti). Intertempe oni aprobis diversajn terminojn kiuj estas diversaj aŭ similaj kaj samaj kiel solvoj de Zupanič kaj Sekereš. Eĉ oficiala (esperanta) fervoja terminologio ekzistas ekde la fino de 1980-jaroj. Sed aliflanke tre interese estas ke unuopaj solvoj en tradukado de oficialaj fervojaj (juraj) terminoj oficiale ekzistas en nenia formo en Fervoja Terminaro. Ĉu ekzistas falsaj solvoj aŭ nesufiĉe bonaj estas problemoj por si mem kaj por obstina laboro, diskutoj, ktp.

Ĝenerale estas necese rimarki du terminojn – estas grave por diferencigi terminojn „valorodeklaro“ sub numero 02388 (france „valeur déclarée“) de termino „valoro deklarita“ („déclaration de valeur“) sub 09516 kaj ambaŭ sub signo VS20.

Kiel estas evidente el signifoj de terminoj, „valoro deklarita“ estas la termino por esprimi aferon al kiu rilatas - monsumo de valoro de varo,

sed „valorodeklaro“ koncernas juran formon (dekretopunkton) pri devigo por enskribi informojn pri valoro de varo en transporta letero. „Deklarita valoro“ estas difinita en artikolo 34 kiel bazo por apliki dekretopunktojn (paragrafojn) de artikoloj 30 en kazo ke sendanto kaj transportisto interkonsentas pri ebla pli granda monsumo ol kompensa sumo regulita laŭ artikolo 30 (borsa aŭ merkata valoro de varo). En artikoloj 30-32 de CIM (Aldono B de COTIF) estas regulitaj kompensoj por damaĝoj (perdo, pezoperdoj kaj difektigoj de varo). Ankaŭ estas grava apliko de art. 33 kiel tarda kompensa.

Interesindiko pri sentarda livero en artikolo 35 kiel jura dekreto de CIM rilatas sole al tardlivera kompensa kiel ekonomia instrumento en art. 33. Sed laŭ art. 35 ekzistas ebleco por postuli aldonajn kompensojn pro damaĝoj laŭ artikoloj 30, 32 kaj 33 se oni pruvas ilin ĝis deklarita valoro en transporta letero.

En naciaj terminoj ne ekzistas nun (kio ne signifas ke ne estas eblaj) adekvataj terminoj por adjektivoj „senprokrasta“ kaj „sentarda“. Ekzemple, germanaj kaj francaj terminoj estas sen adjektivoj kun substantivoj. En Z/S traduko estas terminoj „kompensa sumo pro la trapaso de livertempo“ kaj neŭtrala „interesindiko pri livero“ sed en Fervoja Terminaro estas „interesindiko pri senprokrasta livero“ kaj „tarda kompensa“. Noto: Dum 59-a IFEF kongreso Terminara Sekcio aprobis terminon „interesdeklaro pri livero“.

En Fervoja Terminaro estas sekvantaj terminoj koncerne nian aferon laŭ alfabeto (kun numeroj kaj signoj) kiel terminoj en Esperanto, franca, germana kaj angla:

02897 – MA10 damaĝkompensa – dommages-intérêts /pl/ - Entschädigung; Schadenersatz – consequential damage

04575 – VS20 damaĝkompensa (pro difektiĝo) – indemnité pour avaries – Entschädigung bei Schädelfällen (Beschädigungen); Schadenersatzbetrag; Schadenregulierung – compensation for damage

04579 – PS30 damaĝkompensa ekstertarifa - indemnité compensatrice autre que tarifaire – aussertarifliche Ausgleichentschädigung - compensation indemnity other than tariff

04580 – PS30 damaĝkompensa laŭtarifa – indemnité compensatrice tarifaire – tarifliche Ausgleichentschädigung – compensating tariff indemnity

02386 – VS20 interesindiko pri senprokrasta livero – déclaration d'intérêt à la livraison – Angabe des Interesses an der Lieferung; Lieferwertangabe – declaration of interest in delivery

04688 – VS30 intereso pri sentarda livero – intérêt à la livraison – Interesse an der Lieferung; Lieferwert – involvement in delivery

04584 – VS20 kompenso tardlivera – indemnité de retard – Entschädigung für Lieferfristüberschreitung

00273 – VS30 pezoperdo dumtransporta – creux de route; déchet de route; freinte de route – Abgang unterwegs; Gewichtsverlust beim Transport; Gewichtsschwund während der Beförderung – loss in weight during transit

04572 – VS20 sumo kompensa – indemnité (dédommagement) – Entschädigung; Entschädigungssumme – damages (settlements of a claim)

02388 – VS20 valordeklaro – déclaration de valeur – Wertangabe – declaration of value

09516 – VS20 valoro deklarita – valeur déclarée – Wertangabe; angegebener Wert; deklariertes Wert – declared value.

Eble estas konsideri esperantajn terminojn kiel bonaj kaj akcepteblaj. El teksto de CIM kaj eventuale aliaj fontoj estas eble fari difinojn. Bedaŭrinde ne ekzistas oficiala termino en FT pri perdo de varo (sed akceptebla estas menciita termino). Same estas kun termino pri „interezo“ ktp. Ekzistas ankoraŭ terminoj kiuj estas eblaj en apliko, kiel: 05796 – VS40 difektiĝo pro malsekiĝo - mouille kaj 09642 – VS30 difekto natura – vice propre.

Oni povas anstataŭigi vorton „indiko“ per „deklaro“. Interalie, termino sub 02388 „valorodeklaro“ ne estas „valorindiko“. En franca kaj angla lingvoj (kaj aliaj) estas „deklaro“ en nacilingvaj formoj. Sed pluaj problemoj estas en nacilingvaj kaj finfine en esperantaj terminoj se oni envicigas ilin en kunteksto de CIM laŭ adekvataj artikoloj.

Evidente estas ke termino, akceptinte proponon, „interesdeklaro“ ne rilatas nur en „senprokrasta livero“, eĉ en tutaj kondiĉoj de la livero, inkluzive perdo, difektiĝo kaj trapaso de liverlimtempo pro malfruiĝo de varo (laŭ artikolo 35). En artikolo 35 estas permesata pli granda kompenso (kaj deklarita valoro kiel kondiĉo por pli granda kompenso) ol en artikoloj 30, 32 kaj 33. Pro tio propono povas esti „interesdeklaro pri la livero“ pro nekorekta ĝisnuna esperanta termino. Oni povas preferi inter tri proponitaj

terminoj ĉi-tiun solvon ĉar ĝi estas neŭtrala aspekte de uzado de adjektivoj („sendamaĝa“ kaj „laŭregula“). Respektante PIV aspekte de termino „damaĝo“ eble estas uzi ankaŭ adjektivon „sendamaĝa“. Adjektivo „laŭregula“(en jura senco) ankaŭ estas bona. Sed laŭlitere de oficialaj lingvoj de UIC estas pli bone uzi terminon kiel substantivon sen adjektivo. Aliflanke estas necese akcepti tiam solvon kiel estas „intereso pri la livero“. Franca, germana kaj anglalingva terminoj ne enhavas adjektivojn. Nuna esperanta termino enhavas adjektivon „sentarda“, sed estas bone kaj korekte ellasi ĝin. El franca, germana kaj angla termino estas evidente ke termino rilatas al ĝeneralaj kondiĉoj de la livero, ne nur al sentarda.

Estas necese diferencigi terminojn „valordeklaro“ kaj „deklarita valoro“. Unue estas jura devigo, sed due estas konkreta monsumo kiu oni povas enmeti en transporta letero en kadro de adekvata rubriko. Problemo de (ne)ekzistado de difinoj estas afero por si mem, sed ni devas respekti nuancojn en nia skribado (dokumentoj) ktp.

Kiel ekzistas termino „avizo pri perdo“ sub numero 00620 kaj signo VS20 tiel ekzistas ankoraŭ „avizo pri mankaĵo“ sub 00618 kaj VS30, inkluzive aliajn „perdo pri ...“. Do, rekte ne ekzistas „perdo de varo“ kiel la plej proksima termino en tute adekvata signifo. Nome, „avizo“ estas informo aŭ anonco kiel reago post fakto ke okazis perdo de varo. Pro tio ne estas problemo en konkludo, ĉu „perdo de varo“ povas aŭ ne povas esti prava fervoja termino. Evidente, unuopaj terminoj mankas en oficiala fervoja terminologio.

En germana teksto ekzistas ankaŭ diferencoj laŭ FT. Vidu kelkajn germanajn terminojn en originala teksto de „CIM Einheitliche Rechtsvorschriften für den Vertrag über die internationale Eisenbahnbeförderung von Gütern“ (Anhang B zum Übereinkommen - Aldono B por COTIF – Konvencio pri la internacia fervoja transporto):

Artikel 30 Entschädigung bei Verlust

Artikel 31 Haftung bei Schwund

Artikel 32 Entschädigung bei Beschädigung

Artikel 33 Entschädigung bei Überschreitung der Lieferfrist

Artikel 34 Entschädigung bei Wertangabe

Artikel 35 Entschädigung bei Angabe des Interesses an der Lieferung

Artikel 36 Verlust des Rechtes auf Haftungsbeschränkung

Artikel 37 Umrechnung und Verzinsung.

Grava noto: Ĝis la jaro 1980 ekzistas Internacia Konvencio pri Fervoja Vartrafiko kiel aparta dokumento (ankaŭ ekzistas konvencio pri pasaĝertrafiko). Ekde la jaro 1980 okaze de aprobo de COTIF ambaŭ eksaj konvencioj fariĝis reguloj (juraj preskriboj) en formo de parto A kaj B de COTIF).

Finfine estas menciinde ke en Kroatio aperis du versioj de traduko de CIM en kroata lingvo. Unua versio estas en la oficiala gazeto de Respubliko Kroatio („Narodne novine“) surbaze de angla teksto ellaborita flanke de Ministerio pri trafiko kaj komunikaĵoj. Dua versio estas surbaze de germana teksto de CIM tradukita flanke de Kroataj Fervojoj. Ekzistas diversaj kroataj fakterminoj uzitaj en du versioj. Tio estas grave por akcenti kunordigon en faka laboro, lingvaj analizoj kaj serĉado de unikaj solvoj. Kompreneble, plej grave estas elimini diferencojn en faka terminologio en celo de plibonigo de praktika apliko de lingvoj.

Fina komento

Kiel estas evidente ne diferenciĝas nur tradukoj de Zupaniĉ/Sekereš kaj nuna Fervoja Terminaro, eĉ iuj germanaj terminoj el CIM de FT. Ĉu CIM (kaj aliaj dokumentoj) devas kunordigi laŭ Fervoja Terminaro (Rail Lex) en nacilingvaj terminoj aŭ inverse? Se nacilingvaj terminoj en UIC terminologio ne estas respektataj en internaciaj dokumentoj ekestas novaj problemoj en precizeco de terminoj. Unu el problemoj estas vico de vortoj kiel elementoj por fakterminoj. Do, UIC kiel kompetenta instanco devas fari konkretajn agojn koncerne terminojn. Esperantaj terminoj devas sekvi unuavice nacilingvajn terminojn de UIC kaj esti la plej bona solvo en tiel difinitaj cirkonstancoj. Oni povas eventuale fari korektojn, aldonajn rimarkojn kaj proponojn. Unu el la solvoj estas ke UIC terminaro aprobas novajn terminojn en kadro de internaciaj dokumentoj kiel (eblo) konkretigo de iuj terminoj kaj poste Terminara Sekcio aldonos esperantajn terminojn kun (precizaj) signifoj kaj difinoj.

LITERATURO: Titoloj de uzitaj fontoj estas en teksto kun bezonataj detaloj.

Aktiva kunlaboro inter IKEF-anoj

Oktobre, dum Ŝanhaja Hidraŭlika Foiro, hispana IKEF-ano Jose Franquesa rendezuis la ĉinan IKEF-anon Chielismo Wang Tianyi. Post la foiro ili vizitis fabrikon de altprema tubo kaŭĉuka, kaj kun la fabriko diskutis pri mendo de 1 x 20' kontenero da tuboj. Similaj kunlaboroj okazis antaŭ duona jaro ankaŭ kun la franca Michel Basso por 1 x 20' kontenero da vitrofibroj, kaj kun la brazila Silvio Mates por 4 x 20' konteneroj da vitrobrikaj. Kompreneble la kunlaboro okazas per Esperanto, kaj ĝi funkcias kiel normala lingvo por internacia komerco.

Alvoko: faru laborplanon

Antaŭ kelkaj tagoj nia UEA-prezidanto R. Corsetti sendis alvokan mesaĝon pri nova laborjaro kaj nova plano kun invito al ĉiuj aktivaj esperantistoj kaj movadaj institucioj. Subtene al tiu alvoko prezidanta mi provas same instigi vin entuziasme akcepti ĝin, ĉar temas pri alvoko invita: en ĉiu via organizaĵo, loka, landa aŭ internacia, provu starigi laborplanon, en kiu estu la tri branĉoj: informado, instruado, utiligado, kaj provu agi laŭ tiu laborplano en la komenciĝanta laborjaro.

La konkretajn erojn de tiu laborplano varios, evidente, de situacio al situacio. Mi invitas vin viziti la retpaĝon de UEA, www.uea.org, kie vi trovos la punktojn de la laborplano, nur por doni al vi ideojn.

Mi ankaŭ profitas por memorigi al vi ke la jaro 2006 eniris la lastan trimestron kaj surbaze de la koncerna laborplano vi provu de nun kolekti la plej gravajn raportindaĵojn de tiu ĉi jaro por prezenti koncizan sed enhavriĉan labor-raporton de la nuna jaro. Ne forgesu ke la estrara raporto de UEA klopodas doni superrigardon pri la agado de la landaj kaj lokaj organizaĵoj. Ni laboru por ke la raporto de via lando aŭ grupo estu kiel eble plej reala kaj stimula por eniri la novan laborjaron kun renovigita entuziasmo kaj realigebleco en ĉiuj planataj agoj.

Maritza Gutierrez González, Estrarano pri Landa kaj Regiona Agado